Universala Esperanto-Asocio

AKTIVULA MATURIGO

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2017-13 sendita el Vroclavo, la 19an de majo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

## Plia Universitata Simpozio en Centra Eŭropo

Dulingva altnivela simpozio okazis en la 19a de majo 2017 en la Universitato de Vroclavo en okcidenta Pollando. La progamo daŭris kvin horojn kun dekkvino da kontribuantoj, laŭplane la duono esperantistoj kaj la duono polaj profersoroj. Sekve, multo bezonis sinsekvan tradukadon, kompence al la tempuzado, la posttagmezo tamen ebligis al pluraj polaj profesoroj aŭdi Esperanton, kaj konstati, ke ĝi estas parolebla kaj funkcias. La universitata revuo anticipe aperigis artikolon pri Esperangto kaj la simpozio kaj poste aperigos duan artikolon pri la realigo.

En la malferma ceremonio bonvenigon donis la rektoro de la Vroclava Universitato, prof. dr. hab Adam Jezierski. Sekvis salutoj de du honoraj patronoj de la simpozio: por Akademio Internacia de la Scienoj (AIS) prof. Reinhard Fössmeier laŭtlegis saluton de Amri Wandel, la prezidanto de AIS, kiu menciis la ĵusan statuson de Vroclavo kiel Eŭropa Urbo de la Kulturo. Por UEA salutis ĝia vic-prezidanto, kiu menciis du lastatempajn simpoziojn en la regiono, en Poznano (PL) kaj en Timişoara (RO). Li bonvenigis la ĵusan decidon de EU doni al ukrainanoj senvizan aliron al la Unio – kio malfermas la vojon al pli kontentigaj kontaktoj inter la universitato de Luyck kaj aliaj en Eŭropo.

La esperantistaj referantoj  estis Malgorzata J. Komarnicka (Mallonga historio de Esperanto kun etleciono), Stefan MacGill (Rolo de denaskaj esperantistoj), Lidia Ligęza (Poezio kaj literaturo en Esperanto), kaj Reinhard Fössmeier (Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino – organizo kies celo estas mildigi la rolon de lingva diskriminacio en la scienca komunikado). Ĉiu ricevis po 20 minutojn, inkluzive kelkkaze de la traduktempo.



Sur la foto: Prelegas Lidia Ligęza kaj prezidas Reinhard Fössmeier.

Pli frue en la 18a kaj 19a de majo okazis la 34a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). La temoj inkluzivis prezentaĵon pri la baldaŭ finiĝanta Jaro de la Lernanto, kaj pri la temo de denaskismo inter esperantistoj kompare kun aliaj lingvoj. Prepara teksto disiris kun EKO 12. Kvankam neniu alia partoprenanto estis denaska esperantisto, multaj havis spertojn pri du-lingvaj familioj, aŭ vivado en lando, kie oni ne naskiĝis kaj la neformala karaktero de la seminario permesis aŭdi multajn rilatajn spertojn.

Post paŭzo sekvis pollingvaj prezentaĵoj: Prof. Adam Jezierski (Ekumena Vroclavo), Prof. Jan Miodek (La pola de la jaroj 1918-2018), Prof. Piotr Oszczanowski (Arto en Vroclavo), Prof. Janusz Degler (Muzeo de Teatro en Vroclavo), Dr hab. Joanna Subel (Muziko en Vroclavo). La tago finiĝis per resumo de la simpozio, plenumita de Barbara Despiney, dr hab. Universite Paris 1 Pantheon-Sorbonne (Francio).

En postaj tagoj sekvos kantkonkurso, en kiu partoprenos 130 personoj, diversaĝaj: infanoj, junuloj kaj personoj el la ora generacio, kiel solkantistoj kaj korusoj. La ĵurianoj juĝo nur la kantojn prezentitajn en Esperanto.

Vortoj: 440

Fotoj el koncerto de la germana kantisto Kaŝi, kun improvize aldonita artisto, Jomo el Francio. La du fotoj (de SMG) ne estis faritaj sammomente, do Jomo sukcesas aperi kaj sceneje kaj en la ap,laŭdantaro.





Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.
**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.